

starto

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



1979 · 2 · (72)



HALTU POR MOMENTO KAJ PENSU PRI VIA SANO

De tago al tago, de jaro al jaro vi senĉese ion kaptas, ĝis maksimumo streĉante la risorton de via sano. Kiel longe vi volas ankoraŭ toleri tion? Pripensu, ke vi havas nur unu sanon - kaj ebligu al ĝi por tre modera prezo tion, kion ĝi meritas : la kompleksan kuracodon en unu el la plej antikvaj kaj rekonataj banlokoj de Eŭropo.

ĈEHOSLOVAKAJ BANLOKOJ

- oazoj de sano, trankvilo kaj inspiro -

KARLOVY VARY
FRANTIŠKOVY LÁZNĚ
MARIÁNSKÉ LÁZNĚ
JÁCHYMOV
TEPLICE V ČECHÁCH
PODĚBRADY
JÁNSKÉ LÁZNĚ - TŘEBŇ
JESENÍK - LURAČOVICE
TEPLICE NAD BEČVOU

o o o o o o o o o o o o

BALNEA

Reprezentanto
de ĉeĥoslovakaj
banlokoj
kaj kurac-fontoj,
Pařížská třída 11,
110 01 PRAHA 1

ĈEHOSLOVAKIO

Tx: 122 215



BALNEA
PRAHA

[*] KOMUNIKO [*]

pri la 12-a Konsultigo de Esperanto-organizoj
de socialismaj landoj.

De la 6-a ĝis la 9-a de aprilo 1979 okazis en **Visegrád** /Hungario/ la 12-a Konsultigo de E-organizoj de socialismaj landoj, kiun partoprenis la reprezentantoj el Bulgario, Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Jugoslavio kiel observanto, kiu ne partoprenis la voĉdonadon, Pollando, Soveta Unio kaj Vjetnamio.

La partoprenintoj pridiskutis la ĉefajn taskojn de la E-movado kaj interŝanĝis spertojn pri ilia realigo en la kadro de la priprofundiganta kunlaboro inter Esperantaj organizoj de la landoj kun simila socia strukturiteco.

Dum la diskutado estis substrekitaj aktiva partopreno de la E-movado en la tutmonda packonstruado.

La Konsultigo akceptis la deklaron, kiu esprimas apogon por la pacdefendo en Vjetnamio.

La partoprenintoj esprimas dankon pro la modela organizo de laborokondicoj kaj pro la tre gastema prizorgo al gastigantoj t.e. Hungara Esperanto-Asocio.

Visegrád, la 9-an de aprilo 1979.

Partoprenantoj de la 12-a Konsultigo

rezoluce

12. poradní zasedání představitelů esperantských organizací v socialistických zemích vyslovuje své velké rozhořčení nad zlomyslnou agresí Č i n y proti mírumilovné Vietnamské socialistické republice, nad barbarskými zločiny proti civilnímu obyvatelstvu Vietnamu.

Účastníci poradního zasedání vyjadřují svou solidaritu s trpícím vietnamským lidem, hrdiným obhájcem své svobody a nezávislosti a vyzývá všechny esperantisty k účasti ve snahách pokrokových sil světa na podporu vietnamského lidu.

► Nechť žije mír v jihovýchodní Asii a na celé zemi! ◄

Honoran insignon de MEM ricevis okaze de la 3-a kongreso de CEA tiuj ĉi esperantistoj:

MUDr. Josef HRADIL, Zdeněk HRŠEL, Ludvík CHYTIL, Dr. Jaromír JERMAŘ, ČSc, Jiří KORINEK, Zdenko KRILSKÝ, Antonín ODEHNAL, Linhart RYZNAR, Adolf STANURA, Eli URBANOVÁ, Jaroslav ŽAK.

Ni pardonpetas la distingitojn, ke iliaj nomoj aperas kun malfruigo.

Letero el UŜSR

Asocio de sovetiaj esperantistoj

Karaj gekamaradoj, fondita

per tio ĉi ni informas, ke la 14-an de marto 1979 en Moskvo en la Domo de amikeco kun eksterlandaj popoloj de aktiva helpo de Unuiĝo de sovetiaj societoj de amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksterlando (SSOD), Tutsovetia Centra Konsilio de Sindikatoj (VCSFS) kaj Centra Komitato de Tutsovetia Leninisma Komunista Unuiĝo de Junularo (VLKSM) okazis la Tutsovetia fonda konferenco de la Asocio de sovetiaj esperantistoj (ASE). La konferencon partoprenis delegitoj de Esperanto-kluboj kaj Esperanto-organizaĵoj de urboj, regionoj, teritorioj, autonomaj kaj uniaj respublikoj kaj ankaŭ reprezentantoj de kelkaj sendikataj kaj junularaj organizaĵoj, de amikocietoj.

La konferenco konfirmis la Regularon de la Asocio de sovetiaj esperantistoj, elektis ĝiajn gvidorganojn - la Estraron kaj Prezidion de la Asocio.

Estis elektitaj la prezidanto de la Asocio de sovetiaj esperantistoj - prof. d-ro Mahomet Isajev, vicprezidantoj Zubkov N.B., Makovskij A.I., Podkaminer S.N., Samodaj V.V., respondeca sekretario Berjoza A.V.

La partoprenintoj de la konferenco unuanime decidis konsideri la cefajn taskojn de la Asocio kaj de la membro-organizaĵoj aplikantaj Esperanton, por la firmigo de paco kaj disvolvado de la kulturaj ligoj de la sovetia popolo kun la popoloj de aliaj landoj; helpadi esperantistojn en lernado de Esperanto kaj profundigo de ĝia scio; eduki la sovetiajn esperantistojn en la spirito de patriotismo kaj internaciismo, malkompromisemo koncerne la reakcian ideologion, faŝismon, koloniasmon, rasan diskriminadon kaj socian maljuston.

La konferenco esprimis konvinkon, ke la Asocio kontribuos al disvolvado de la internaciaj ligoj de sovetiaj esperantistoj kaj koordinigos la aktivadon de la lokaj Esperanto-grupoj en la interna kaj ekstera sferoj.

Akceptu niajn sincerajn bodezirojn!

Prezidio de Asocio de sovetiaj esperantistoj

Umělý jazyk! Co z lidských výtvorů není umělé? Sekera, lokomotiva, letadlo, ... Zda to všechno není umělé? Jak tyto nástroje, tak i jazyk pochází ze stejného pramene: z každodenní potřeby. Naše celá kultura je umělá; a díky tomu nám velmi dobře slouží.


A přece ... proč za padesát let esperantisté dosáhli jen tolik? Mnohé nesmyslné předsudky zkoušely a ještě se pokoušejí bránit cestě k budoucnosti. Padesát let je historicky pouhý okamžik a za ten okamžik semě vzklíčilo, stalo se vysokým košatým stromem, který se už nebojí sucha.

Maxim Gorkij, 1933 (podle čas. Juna Amiko)



CALEX

CALEX 170 R 



PRODUKTAS:

CALEX

NÁRODNÝ PODNIK
ZLATÉ MORAVCE



AGADOJ DE ĈEA

La estraro de ĈEA decidis organizi dum la Internacia Jaro de Infano jenajn aranĝojn:

- ekspozicion de infandeseĝnaĵoj, kiujn pasintjare kolektis Junulara komisiono. Ĝi estos prezentita en pluraj urboj kaj infanoj mem elektos per demandiloj tri la plej belajn deseĝnaĵojn. Iliaj aŭtoroj estos invititaj kun siaj gepatroj al Ĉeĥoslovakio kiel gastoj de ĈEA;
- eldonon de bildkarto kun infandeseĝnaĵo. La netan vendo-profiton ĈEA dediĉos al "Konto de solidareco";
- finanĉan helpon al unu lernejo en Vjetnamio, en la loko, kie okazis la ĉina agreso, per mondonaco de 10.000 Kčs. Por tiu ĉi sumo estos acetitaj papero, kajeroj, kraĵonoj k.a. bezonaĵoj kaj per aviadilo senditaj al Vjetnamio. En la momento, kiam vi legas tiujn ĉi liniojn, la donaco jam verŝajne estos en VSR.

Ĉiuj, kiuj volas same helpi, sendu mondonacojn rekte al ĈEA, al speciala konto "Infanoj de Vjetnamio".

Sekretarion de Ĉeĥa Esperanto-Asocio Z. Křimský akceptis en Vjetnama ambasadejo en Prago komence de aprilo chargé d'affaires Luu-Viet-Dan, kiu estas esperantisto. Ili traktis pri la eblecoj de pli vasta kunlaboro inter la esperantistoj de ambaŭ landoj. K-do Luu-Viet-Dan promesis baldaŭ viziti la asocian sekretariejon.

● ● Priinfana ekspozicio per esperantistoj ● ● ●

La Esp. societo PROGRESO, 5180 Polski Trambes, Bulgario, kolektas erojn por la ekspozicio "La vivo kaj revoj de la infanoj de la mondo" okaze de Internacia infana jaro kaj helpe de la esperantistoj tutmonde. La kontribuajtoj devas atingi la societon ĝis la 20a de majo 1979. Temas pri:

- 1) Autentikaj fotoj, eltranĉaĵoj, afiŝoj ks. pri diversaj aspektoj de la infana vivo (ludoj, festoj, sporto, familio kaj lernejo, porinfanaj organizoj kaj ties simboloj);
- 2) Porinfanaj periodaĵoj;
- 3) Ilustraĵoj pri la infana Esperanto-agado;
- 4) Afiŝoj, gazetartikoloj k.a. pri la Internacia Jaro de la Infano;
- 5) Infandeseĝnaĵoj laŭ la elektita temaro;
- 6) Porinfanaj objektoj el aliaj landoj.

La ekspoziciaĵoj povas esti en kiu ajn lingvo kun Esp. traduko. Ĉiu kontribuajto estos rekompencita!



DUM VIA VIZITO EN ĈSSR

VIZITU ANKAŬ PARKON

DE KULTURO KAJ RIPOZO

EN BRATISLAVA

La Esp. societo en Oulu, norda Finnlando, aranĝos ekspozicion de infanaj desegnaĵoj. La elmontro okazos komence de septembro. Oni esperas havi desegnaĵojn, faritajn de infanoj ĝis inkluzive 14-jaraj. La temoj estas: INTERNACIA AMIKECO, HEJMO, LERNEJO kaj INFANAJ LUDOJ. La limdato por la alsendado de la desegnaĵoj estas la 30-a de junio. Ĉiu partoprenanto ricevos finnan memoraĵeton. Krome, la plej bonajn oni premie rekompencos.

»» Ĉu »ensorcita cirklo«? ««««««««««««««««««««««

Kardinalan problemon de l' esperantismo denove levis Interlingvistika Informa Servo (1979/1) en la artikolo "Esperanto inter la lingvaj frontoj", kiu resume eksplikas indiferecon de la ŝtatoj kaj grandaj internaciaj organizoj rilate Esperanton. Malgraŭ tio, ĝi konkludas, la ĝeneralaj kondiĉoj pravigas la celojn de Esperanto, kaj tiu ĝi unusola havas sancon roli kiel neutrala interlingvo. La ĉefa tasko estas pli intense klopodi interesigi pri la problemo politikistojn kaj sciencistojn kaj samtempe vastigi la movadan bazon.

Kvankam la decidaj paŝoj tiudirekte ankoraŭ longe ne estas atendeblaj, ambau faktoroj - la ekstera kaj interna - povas interdependigi unu la alian kaj akceli la solvon. Ĉiufanka aplikado de la Internacia lingvo kaj de ĉiam pli efikaj metodoj por fiksi ties atingojn sur diversaj agadkampoj daŭre influas la publikan opinionon.

Sed la klopodoj kontraŭ lingva surdmuteco postulas etendiĝon sur multe pli vasta tereno kaj en pli variaj formoj. Vabri maksimumon da adeptoj - ĉu movadanojn au subtenantojn de la ideo - tio signifas pli pozitivan fronton realon de la multlingva mondo. Tio signifas dialogon kun ĉiuj potencialaj aliancanoj, kiuj emas komprenigon, eĉ se ne per unusola komuna lingvo.

Dilemo inter la "indiferenta mondo" kaj la movado proponanta racian komunikilon, estas plivere mito, se oni - kaj ne senbaze - apartigas la problemon pri la oficialigo de Esperanto, kiel ĝin imagis generacioj de la movadaĵ pioniroj, disde tiu rilate la apogon al ĝiaj celoj. Zamenhof ja estis la unua modesta pledanto, kiu sisteme submetis sian lingvoprojekton al Amerika Filozofia Societo, serĉante oficialan aprobon. Aliflanke malfavora sinteno al Esperanto de ekstere ne unufoje bremsis adaptigon de la esperantistoj al la novaj cirkonstancoj, kaj anstataŭe evoluigis konvinkon pri la propra kapablo "trabori la monton granitan" pacience kaj diligente plugante la sulkon. Estas do nature, ke la klopodoj konsciigi la eksteran mondon, al kies dispono la interlingvo estas destinita kaj al kies garantioj la esperantistoj dekomence rifugas, devos montriĝi senfruktaj, se la konsciigo interne ne estas adekvata.

El tio naskiĝas aliaj kontraŭdiroj, kiuj povas nur helpi konservadi antaŭjugojn nedeziratajn en avangarda kaj racia

movado kiel Esperanta - tiurilate imago pri iu epsorcita cir-
rklo, lau kiu nenia esenca ŝango okazas por antaŭenigi Espe-
ranton. Preferindus tamen konstato, ke ekzistas nur novaj kaj
novaj neelprovitaj vojoj kaj eblecoj.

Hodiaŭ malpli ol antaŭe iu ajn nacia lingvo havas ŝancon
farigi universala - kiel videble lau la situacio eg UNO, plue
en la iamaj kolonioj au en la regiona skalo (ekz. Eŭropo). Jen
la dilemo de la multlingveco. Sed cu la lingvo internacia po-
vas aliflanke pretendi tian rolon en la tempo, kiam kun im-
peto de la diverspopolaj kulturoj ŝtormas naciismo kaj ling-
vaj malpacigoj, kiam interne de la ŝtatoj au interŝtataj u-
niigoj iu lingvo superregas la alian?

Akceptigo de Esperanto kiel komuna lingvo estas perspek-
tivo simila al tiu de la daŭra paco, nedekretigita, tamen
konstante kaj sisteme konkerata per amasmovadoj. Starigo de
alianco kontraŭ la lingva surdmuteco kiel nepra kondiĉo, kiu
pravigos nian celon, povas esti reala kaj pozitiva programo.

O. Knichal

)nia recenzo ((•))

PRAKTIKA BILDVORTARO DE ESPERANTO

Sur 75 plenkoloraj paĝoj pli ol 2.000 vortoj en Esperan-
to. La ilustraĵoj ampleksas urbon kaj kamparon, la hejmon, be-
stojn kaj birdojn, okupojn, veturilojn, sportojn, la lerne-
jon, vestaĵojn kaj la homan korpon, kiel ankaŭ aliajn temoj-
jn. Mallonga gramatika sekcio enhavas adjektivojn, verbojn,
prepoziciojn kaj kolektivajn vortojn. Per nigrablanka apen-
dikso aldoniĝas numeraloj, proverboj, landoj, valutoj, alfa-
betoj kaj la tabelvortoj. La libro taŭgas por komencantoj
kaj ankaŭ por pli spertaj esperantistoj kiuj ne havas la tem-
pon detale traserĉi pli grandajn vortarojn por trovi tiun au
alian konkretan terminon.

Prezo 10 nederlandaj guldenoj au egalvaloro. Mendu ĉe UEA
au rekte ce eldonejo: LANGUAGE SERVICE, 17 HIGH STREET, ST.
PETERS, BROADSTAIRS, KENT, ANGLIUNJO.

Planlingvo laŭ fremdlingvaj pedagogoj

Pri la starpunkto de iuj elstaraj specialistoj pri la fre-
dlingva instruado kaj samtempe ankaŭ pri la informiteco en
tiuj ĉi fakrojdoj rilate la Internacian lingvon Esperanton oni
povas ĵugi lau la enketo, kiun entreprenis la redakcio de
PACO, ĉeĥoslovaka eldono. Al ĝu el la demandoj, nome kian
signifon povus havi akcepto au instruado de neutrala plan-
lingvo por superi interkomunikajn ĉarojn, ili reagis jene
(la respondojn ni citas komplete au grandparte):

Sub la nocio "neŭtrala lingvo" verŝajne kompreniĝas tia lingvo, kies lingva materialo baziĝus sur pluraj naciaj lingvoj kaj kiu ne estus peranto de kulturo, civilizo kaj ideologio de unu nacio, diras doc.d-ro A. Strižov, CSc el Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj. Akcepto de neŭtrala internacia komunika lingvo, se tiu ĉi estus facile finfernebla, povus krei antaŭkondiĉojn por internacia komprenigo sur certa nivelo.

Estas neeble dubi pri tio, ke ankaŭ instruado de neŭtrala internacia planlingvo kontribuas al propagando de nia respubliko eksterlande kaj al internaciaj kontaktoj kaj komprenigo, eĉ se en malpli alta grado ol ce la naturaj vivantaj lingvoj: planita artefarita internacia lingvo ne estas portanto de nacia kulturo kaj tio estas ĝia handikapo kompare al grandaj lingvoj naturaj. Alimaniere tia internacia lingvo povus esti kompreneble instruata en iuj niaj mezlernejoj. (Doc. PhDr. J. Nosek, DrSc, Filozofia fakultato de Karola Universitato en Prago).

Ĝi (la IL - rim.de red.) havas grandan signifon, sed mi ne opinias, ke la nuntempa "homo sapiens" estas por tia tasko preparita. Kiam estos solvita la problemo de senarmigo, kiam baze malgrandigos antagonismoj de la sociaj sistemoj, estos eble pli multe da emo, komprenemo kaj certe ankaŭ da rimedoj por akcepti tian internacian lingvon. Esperantistoj estas tiucele sentimaj pioniroj. (J. Wolt, vicdirektoro de Lingva Lernejo, Prago).

Instruado de neŭtrala planlingvo povus laŭ vidpunkto teoria faciligi la internacian komunikadon, sed nia opinie nuntempe ankoraŭ ne estas antaŭkondiĉoj por devige instrui tian lingvon, i.e. pro tio, ke la deviga instruado devus esti enkondukita fakte en ĉiuj landoj de la mondo. (Doc.d-ro V. Irgl, CSc, estro de la katedro de neslavaj lingvoj, Ekonomia altlernejo en Prago).

(k)

KIU TRADUKIS KION

Respondon al tiu ĉi demando atendas Ĉeĥa Esperanto-Asocio de ĉiuj, kiu(j) disponas pri la ĝis nun nepublikigita(j) traduko(j) el la ĉeĥa literaturo - beletra aŭ scienca - aŭ kiu(j) estas tradukantaj tiajn verkojn. Por povi laŭplane eldonadi estas grave scii tion. Precipe nun, kiam la Asocio lanĉas preparojn por eldono de la antologio de la moderna ĉeĥa literaturo en Esperanto. Tiurilate nin interesas precipe la aŭtoroj de la lastaj sep - sep jardekoj. Bv. do sendi kopion de Via(j) traduko(j) aŭ almenaŭ atentigi pri ties ekzisto kaj amplekso. Eble ne necese akcenti, ke la tradukoj devas esti maksimume bonkvalitaj!



INCHEBA

79'

**XI. Internacia
foiro**



23.-29.6.1979

**EN BRATISLAVA
PARKO DE KULTURO
KAJ RIPOZO**



**VINTRA
STADIONO
DOMO
DE TEKNIKO
SVTS**

ĈEFTEMOJ DE FOIRO:

»PLASTOJ« KAJ »KEMIO POR VIRINOJ«

diskutoj - proponoj

■ INFORMADO EN NACILINGVAJ PERIODAĴOJ ■

Mi rigardas la informadon pri Esperanto sur la landa kaj kaj loka niveloj kiel kolektivajn agadon, kiun kunordigas la landa asocio, Plenumas tiun laboron kompetentaj individuoj aŭ sendepende aŭ en kunlaboro kun lokaj grupoj kaj fakorganizaĵoj. Oni uzas kiel informad-rimedojn jam ekzistantajn magazinojn kaj revuojn, aŭ oni eldonas apartan nacilingvan pri-esperantan periodaĵon.

Mi proponas, ke oni faru ĉi-jare liston de proksimume du-dek periodaĵoj en diversaj kampoj kaj tasku al la plej kompetentaj kaj verkemaj esperantistoj la preparon de artikoloj celantaj la legantaron de ĉiu periodaĵo. Cetere, la programo ne estas planita nur por unu jaro, sed devus esti parto de longdaŭra inform-kampanjo.

Jen kelkaj sugestoj por gvidi la laboron de la unua jaro. En ilustrita kultura semajn-gazeto povas aperi, okaze de datrevenoj de gravaj eventoj en la historio de la landa Esperanto-movado, artikoloj pri la pioniroj, kiuj enkondukis Esperanton en la landon kaj ankaŭ pri la eldono de la unuaj nacilingvaj lernolibroj, propagandiloj kaj Esperanto - gazetoj. "La rolo de la virino en la Esperanto-movado" povas esti titolo por artikolo aperonta en virina magazino. Ĝi povas temi pri elstaraj virinoj en la historio de Esperanto, ekzemple Rozalia Zamenhof kaj Klara Zamenhof, la patriko kaj edzino respektive de la iniciatinto de Esperanto, aŭ pri la kvar prezidantinoj, kiuj nuntempe estras la landajn organizaĵojn de Grekio, Kanado, Federacia Respubliko de Germanio kaj Nederlando.

Literaturaĵoj - tradukitaj versioj de noveloj kaj poemoj verkitaj originale en Esperanto - povas trovi lokon en pluraj periodaĵoj. Mallongaj rakontoj taugas por semajna novelgazeto. En porinfana revuo povas aperi fabeloj, rakontoj kaj poemoj, kiuj estas tradukaĵoj de infan-literaturo el aliaj lingvoj faritaj helpe de Esperanto servanta kiel pontlingvo, kaj ankaŭ tradukaĵoj de infan-literaturo verkita originale en Esperanto. Por monata beletra kaj kultura revuo oni povas verki studaĵon kun la titolo "Nia nacia literaturo en Esperanta traduko". Ne nur tradukaĵoj de prozo kaj versoj, sed ankaŭ literaturhistoriaj kaj kritikaj artikoloj taugas por monataj mond-literaturaj revuoj. Ĉi-rilate, ekzistas aliaj publikigaĵoj dediĉitaj al la kompilado de bibliografioj kaj la recenzado de fremdlingva literaturo, kiuj estas mankhavaj, se ne estas mencio pri la beletro de Esperanto. En tiaj periodaĵoj troviĝas informoj pri verkoj en pluraj tiel nomataj "malgrandaj" lingvoj, ekzemple la ukraina, albana kaj jida. Kial ne ankaŭ Esperanto? Aliaj revuoj enhavus ekstraktojn el recenzoj pri novaj beletraĵoj en la ĉefaj europaj lingvoj. Ankaŭ Esperanto estas aldonenda.

Magazinoj dediĉitaj al hobiaj kaj distrado estas alia promesplena tereno, ne nur por artikoloj pri specialaj temoj, sed ankaŭ por regulaj rubrikoj. En magazino por turistoj, oni povas raportii pri turismaj aranĝaĵoj sub la auspicioj de enlandaj kaj eksterlandaj Esperanto-organizaĵoj. La legantoj de filatela revuo certe interregis pri regulaj novaĵoj rilate Esperantajn postmarkojn, poststampojn kaj parafilatelaĵojn.

Pli postulema estas la verkado por fak-revuo, kaj nur fakulo mem sukcesas konvinki aliajn klerulojn. Tauga artikolo por revuo pri la metodologio de fremdlingva instruado povas pritrakti la valoron de Esperanto kiel preparadon por plua fremdlingva studado.

Eĝ multaj periodaĵoj trovigas enhavtabeloj kaj kelkfoje ankaŭ resumoj en fremdaj lingvoj. La kutime uzataj lingvoj estas la rusa, germana, angla kaj franca. Tie ĉi la Internacia Lingvo povas diskrete, ne-sintrude okupi samnivelan lokon apud la grandaj lingvoj. Jen vasta fekunda tereno ankorau neplugita.

B. Golden

■ DIVERSAJ VOJOJ DE DISVASTIGADO DE ESPERANTO ■

Ni, esperantistoj, estas konvinkitaj, ke Esperanto estas la plej bona, kaj nuntempe la unusola lingvo, kiu kapablas forigi la lingvajn malfacilaĵojn. Sed konvinki pri ĉi tiu realaĵo ankaŭ la aliajn - estas iom pli malfacila. Oni ne konas Esperanton kaj lasas sin konvinki nur per faktoj, t.e. per praktika aplikado.

Nia loka grupo estas unu el rondetoj de Unuiginta Uzina Klubo en Roudnice n.L. Da rondetoj estas ĉe ni pli ol dek, kaj sekve en eventualaj aranĝaĵoj por la publiko, ĉesto de 20 personoj, en tiel malgranda urbo, estas jam sukceso. Dum la autuna seĝo de reprezentantoj de la klubaj rondetoj ni proponis serĉi manierojn de kunlaboro inter la rondetoj, aranĝi komunajn vesperojn por la publiko. Nombro da vizitantoj tiel kreskus kaj pri aktiveco de la rondeto eksciis ankaŭ subtenantoj de aliaj rondetoj. Por ni estis klare, ke ni, kiel lingva rondeto, povas proponi kunlaboron preskaŭ al ĉiuj aliaj rondetoj. Ni komencis kunlabori kun la literatura rondeto, kun kiu ni aranĝis la 7-an de februaro 1979. Vesperon pri Božena Němcová. La prezento de Eva Seemannová estis elstara kaj la vespero estas konsiderata generale tre sukcesplena. Ni povas aranĝi pluajn vesperojn kun la literatura rondeto, kaj ankaŭ kun la rondo de muzikamikoj. Simila ebleco ekzistas ankaŭ rilate la rondeton de Konservantoj de la naturo, kie tre interesa estus la kunlaboro kun la esperantistaj naturamikoj.

Sur la alia kampo gojigas nin ebleco kunlabori kun la loka sporta klubo. En nia urbo estas granda sporta halo, kie oni ludas ankaŭ internaciajn matĉojn en korbopilkado kaj flugpilkado. Funkciuloj de la klubo eksciis, ke kelkaj pra-

TATRÁSKLO TATRÁSKI

SKLO TATRÁSKLO TATI

TATRÁSKLO TATRÁSKI

TATRASKLO, trusto de produktan-
toj de vitro, TRNAVA
FABRIKAS EN JENAJ FABRIKOJ:
Spojené sklárne, n.p.
Lednické Rovne

Stredoslovenské sklárne
n.p. Poltár

Skloplast, n.p. Trnava
Skloobal, n.p. Nemšová

Výskumný a vývojový ústav
sklársky Trnčín

DIVERSSPECAJN KEMIAJN KAJ IN
DUSTRIAJN KAJ LABORATORIAJN
VITROJN, VITROTUBOJN, VITRAJN
FADENOJN, VITROSTOFOJN KAJ
PLUAJN PRODUKTOJN.

NI EKSPORTAS EN 57 LANDOJ DE
LA MONDO PERE DE:

OZO Škloexport
PZO Čsl. Keramika
PZO Merkuria
PZO Jablonex
PZO Tuzex
PZO Transakta

TATRÁSKLO TATRÁSKI



VAPORAJN KALDRONEGOJN
EN TUTAN MONDON



PRÓDUKTAS:
SLOVENSKE ENERGETICKE STROJARNE
S. M. Kirova, národný podnik, Tímače

Vi ŝparos vian tempon, kaj lokon,
Vi atingos plenan orientadon
per

ujo por magnetofonaj kasetoj:

kolore ellaboritaj kun ebleco kunmetadi la kasetojn en pli grandajn tutaĵojn, event. kroĉi survande.

Facila elprenoblo de kasetoj: la ujo havas premrisorton.
Prezo Kčs 15,-

ujo por diapozitivoj:

en 4 kasetojn librosimilajn eblas enmeti 144 diapozitivojn.
Prezo Kčs 50,-

Ambaŭ produktoj estas aĉeteblaj en la vendejoj de industrivaroj, en magazenoj kaj en la vendejoj de la produktanto:

Plzeňské dílo, produkta kooperativo,
Skladová 8, 317 55 Plzeň,
vendejoj: Plzeň, Smetanovy sady 13,
Plzeň, nám. Kratwurma 16,
Karlovy Vary, ul. K. Marxe 8.

**Ambaŭ produktoj estas mendeblaj
ankaŭ reimburse rekte ĉe la produ-
ktanto:**

**Plzeňské dílo,
Skladová 8, 317 55 Plzeň**



PRODUKT-EKONOMIA UNUIĜO TESLA

La entreprenoj por elektroniko kaj malfortkurenta teĥniko TESLA reprezentas ĉi-fakan ĉefan produktanton en Ĉeĥoslovakio. La fabrik-programo ampleksas larĝan sferon de investa elektroniko (radiokomunikan kaj telekomunikan teĥnikon, NC-sistemojn, radarojn, elektronikajn kaj mezurajn aparatojn, sekurigan teĥnikon, lumfontojn, elektroĥemiajn lumfontojn kaj plujajn fakojn), sortimenton de aktivaj kaj pasivaj komponentoj kaj larĝan sferon de konsumata elektroniko (televideilojn, radioricevilojn, gramofonojn, magnetofonojn, amplifilojn, elektroakustikajn aranĝaĵojn k.s.).

Elektroniko kaj malfortkurenta teĥniko estas fakoj trapasantaj periodon de abrupta disvolvo. Tiu grandparte influas disvolviĝon de la tuta nacia ekonomio, vicon de plujaj fakoj. TESLA pro tio dediĉas konstantan atenton al plialtigado de teĥnika nivelo de siaj produktoj. En tio rolas ĉefe nivelo kaj kvalito de komponenta bazo, precipe de duonkonduktaloj. Duonkonduktalaj aktivaj elementoj hodiaŭ anstataŭas elektrontubojn preskaŭ en ĉiuj regionoj de elektroniko (escepte de elsenda teĥniko). En ĉiam pli granda skalo estas uzataj integritaj cirkvitoj, kiuj ebligas anstataŭigi kompletajn konstrublokojn de koncernaj aranĝaĵoj. La apliko de duonkonduktala teĥniko influas funkciajn proprecojn de produktoj kaj ankaŭ ties kvaliton kaj fidindecon. Tio reflektiĝas kiel en la sfero de investa elektroniko, tiel ankaŭ ĉe la konsumata.

Novigado de fabrikaĵoj en sfero de konsumata elektroniko evoluas akorde kun la samtempa enmonda strebo. Intenco estas

la satigo de altiganta interesiĝo de konsumantoj pri altkvalitaj aparatoj, kiuj antaŭe estis ekskluzivaĵo nur de profesiaj studioj. TESLA nuntempe fabrikas vicon da aparatoj kaj aranĝaĵoj por fidela reprodukto respondanta al la klaso Hi-Fi, destinitajn por ordinara konsumantoj: stereofonajn radioricevilojn, gramofonojn, magnetofonojn, amplifilojn kaj plujajn fabrikaĵojn.

TESLA KOMERCA ENTREPRENO

Altkvalitaj kaj teĥnike altpretendaj fabrikaĵoj postulas altnivelajn servojn. La ĉefa reprezentanto de la servoj estas TESLA komerca entrepreno, kiu jam pli ol dekjaron liveras elektronikajn produktojn de konsumata kaj investa karaktero inkluzive de komponentoj kaj vicpecoj kaj al socialismaj organizaĵoj kaj al privataj konsumantoj. Tiu ĉi entrepreno estis fondita en la jaro 1966 kaj ekde tiu tempo ĝi elkonstruis ampleksan reton de markvendejoj TESLA, kiuj kronkontanta kaj faktura vendado prizorgas ankaŭ konsultan servon, servon por radioamatoroj k.s. Resume, ĝi strebas pri modelaj servoj en liverado de elektronika varo.

La vendejoj estas direktataj per regionaj centroj, kiuj funkcias kiel entreprenoj kaj zorgas ankoraŭ pri aliepecaj servoj: pogranda liverado, direktado de aktiveco en la servo-reto k.t.p.

Elstaran situon kadre de la servoj TESLA okupas MUDI-SERVIS, kies tasko estas zorgi pri la longtempa luado de televideiloj kaj pri koncernaj riparservoj.

Per liverado de fabrikaĵoj en sfero de investa elektroniko kune kun ĉiuj superaj liverservoj okupiĝas la filia entrepreno TESLA DIZ - Liver-Inĝeniera Enterprise. La plujaj du filiaj entreprenoj komencis sian agadon en la jaro 1979: TESLA ARĤ (Automatigo kaj Racigo de Administrado) kaj TESLA VPMS (Evoluigo kaj Programado de Mikroelektronikaj Sistemoj).



BONAJ AĈETOJ EN "PRIOR", PRAGAJ MAGAZENOJ

- multnombraj servoj al la klientaro
- malfermite ankaŭ sabate
- vendado je ĝirĉekoj kaj ĉiuspecaj pruntoj
- mempriservejoj kaj libera elektado de varoj
- parko por personaj aŭtomobiloj en la magazeno KOTVA

Pražské
obchodní
domy



Kotva
Máj
Bílá labuť
Letná
Dětský dům



AUTOBAZAR
ENTREPRENO »KLENOTY«

ŽILINA • ČADCA • RAJEC • ŠTOF

PLANK-KOVR

OJ • TAPIŠOJ

ILOJ • MEBLAJ • ŠTOFOJ • AEROTERMAJ • KOVRILOJ



MALFERMITA LETERO AL REDAKTORINO DE „PERSPEKTIVO” S-INO R. KRAINER

Estimata sinjorino redaktorino,

kun nemezurebla ĝuo kaj plezuro mi tralegis la artikolon "Kiu estas moderna kaj kiu sekta esperantisto?" en la 4a numero de Perspektivo, kie mi eksciis nekredeblan informon, ke "en Ĉeĥoslovakio oni malpermesis klasikajn teatraĵojn de Molière (eble Vi pensas pri Molière), Lope de Vega, Dürrenmatt, Shakespeare k.a." (kaj aliajn samnivelajn sciindaĵojn).

Mi dezirus Vin atentigi, estimata sinjorino, ke la plejparto de niaj nacioj estas analfabetaj kaj ne konas la menciitajn aŭtorojn; tiuj estas sencese eldonataj en milionaj eldonkvantoj nur por la pli klera intelekta minoritato. Kaj se oni ludas ilin en niaj teatroj (ĉiutage kaj ĉialoke), ĉu oni povas esti certa, ke la cenzuro ne forstrekis ekzemple ĉe Shakespeare la kritikon de marksismo aŭ la kritikon de la gvidantoj de la komunista partio? (Ĉetere, kaj nur inter ni: ĉu Vi fakte legis ion de Lope de Vega? Se hazarde jes, ĉu ne saĝnas al Vi, ke ekzemple Fuente Ovejuna havas klare bolŝevisman tendencon?) 1/

Por la plej noblaj analfabetoj oni ludas ĉe ni la cititajn aŭtorojn kolore en televido kaj en originalaj (angla, franca ktp.) versioj; ĉu Vi povas imagi, kiom da valoraj dolaroj kostas nin tiu ĉi lukso?

Sed Via sankta batalo jam alportas fruktojn. La kritiko en Perspektivo devigis partian organon Rudé právo okupigi pri Shakespeare, Molière k.a. - ĉetere por ĉeĥoj malpermesitaj aŭtoroj, ĉu? - kiel montras ekzemple la ŝnoba disputo pri la problemoj, ĉu la pra-Hamleto (li naskigis laŭdire en Via lando?) laŭ la unua londona eldono por N.L. kaj John Trundell, kiun oni ludas en unu praga teatro, estas fakte la vera antaŭlo de (klasika) Hamleto, kiun oni ludas en alia praga teatro. Tiajn zorgojn do havas nia gvidanta klaso, kiam intertempe oni krucumas kristanojn surstrate kaj torturas esperantistojn en specialaj karceroj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio!

Jam temp' estis 2/, estimata sinjorino: komunisto Brzezinski tenas usonan politikon en la manoj, rugpola papo sidas en Vatikano kaj nun la ruguloj deziras uzurpi la trian plej fortan mondan potencon - la Esperanto-movadon! Tiel forte tenu la tenilon de la sankta "neŭtrala" standardo kaj ne timu ĝin frakasi sur la kapoj de sovagaj kaj senkulturaĵaj bolŝevikoj - alie niaj civilizo kaj kulturo pereos!

Kiel Via sincera admiranto en tiu herooa batalo mi dezirus nur flustrigi al Vi tre intiman informon: ruza sekreta polico en socialismaĵaj ŝtatoj kaj ĝiaj agentoj en Esperanto-organizi-


zaĵoj okcidente volonte misinformas kelkajn naiĵajn redaktorojn de Esperanto-revuoj, kiuj poste prezentigas kun misinformoj al la mondpubliko kiel absolutaj ignorantoj.

Quod erat demonstrandum. 3/

Kun sincera saluto

Por la neŭtralismon 4/

Via PhDr. CSc. Jaromír Jermář,
prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio



Prago, la 1-an de aprilo 1979

Notoj:

- 1/ Ĉu Vi ne legis en Encyclopaedia Britanica 1970, vol. 22, p. 934, ke tiu ĉi verko "...evoked a particular response from audiences in tsarist Russia"?
- 2/ Konata kontraŭkomunisma proklamo de L.L.Zamenhof
- 3/ La citita frazo estas en Volapuk
- 4/ La titolo de la artikolo de L.L. en Internacia Kulturo, 1947, n-ro 1, p. 2

RONDETA VIVO

B R A T I S L A V A - Dum la eksterordinaraj vintraj ferioj en januaro estis en la Biblioteko de marksismo-leninismo organizita, iniciate de ing. Havránek, senpaga kurso de Esperanto. Ĉiutage inter la 10-a kaj 12-a oni kunvenis tie por lerni la Internacian lingvon sub la gvido de la instruistino M. Wertlenová. La ideo estis bona kaj la kursanoj plene entuziasmo, kiel atestas informo en la bratislava gazeto Učiteľské noviny, la 1-an de februaro.

B R N O - El la finjara raporto rezultas, ke la klu-

bo havas 120 membrojn, gvidis du kursojn, abonadis 13 gazetojn kaj eldonis kvin numerojn de sia Bulteno. Krom 39 prelegoj por siaj membroj oni aranĝis kvar publikajn prelegojn, unu kroman en la radio kaj du solenajn koncertojn.

F R Ý D E K - M Í S - T E K - En la kafejo Esperanto oni spektis dramon "Jean kaj mi" en la prezento de E. Seemannová el Prago.

C H E B - La jarkunveno fine de januaro elektis la novan kluban komitaton kun F. Vrchota kiel prezidanto, ing. V. Jandík sekretario kaj reprezentanto en Distrikta Pakkonsilio, V. Mareš, F. Kolafa, W. Vinař kaj J. Vrba kiel komitatoj. Kvar novaĵ membroj estis akceptitaj.

TRANSPORTA

nacia entrepreno, Chrudim

projektas, produktas kaj muntas
ekipaĵojn por longdistanca

✿ bendtransporto en enteraj
minejoj

ekipaĵojn por deponeja mastrumado
plue ĝi elfaras levĉarojn kun flank-
ka ŝargeblo de portkapablo 5t
✿ kaj 6,3t kaj devirsspecajn pesi-
lojn

KARLOVY VARY -
Anoj de la loka grupo kondamnis en sia rezolucio armigitan agreson de Ĉinio kontraŭ VSR kaj esprimis sian plenan solidarecon kun la justa batalo de la vjetnama popolo kaj al la esperantistoj de tiu ĉi lando.

P R A G O - Poeziaĵojn de Jiří KAREN en la traduko de J. Kořínek kaj en la ceseo de l' aŭtoro kaj de konata verkisto F. Kožík recitis E. Seemannová la 17-an de aprilo en la esperantista klubejo.

P Ě Ľ B O R - Klubo de Internacia Amikeco en tiu ĉi urbo aranĝis la ekspozicion Infanoj, Paco, Amikeco, en kiu la spektantoj povis ob-

servi ankaŭ diversajn esperantaĵojn, i.a. atestejn pri la abunda korespondado de la junaj klybanoj. Pro nekutima interesigo de la publiko la ekspozicio estis plilongigita.

La ĉi tieaj esperantistoj lastatempe fervore kontaktas kun la amikoj en Hungario, Sovetio kaj dum la tuta jaro popularigas Esperanton en propagand-kesto kaj helpas Esp.-rondeton en naujara lernejo, str. Jičínská.

P Ě Ľ B R A M - Kvin membroj de la ER partoprenis en marto Internacian Renkontigon "IFER" en Lejpsigo. A. Fišerová, membrino, prelegis en marto kun lumbildoj pri siaj vojagoj en kvar kontinentoj.

KRONIKO

La 18-an de aprilo 70jariĝis s-rino Helena Novobilská, edzino de lernejdirektoro, longjara esperantisto, mortigita en koncentrejo Mauthausen, kaj patrino de nia elstara aktivulo doc. V. Novobilský, CSc. Al la jubileantino, membrino de la ER en Ustí n. L., ni kore gratulas!

Forpasis la 27.2. en Karlovy Vary Anĝonin Mikesshik, aĝa 81 jarojn. Honoron al lia memoro!

SALUTON AL VIRINA TAGO en la nomo de Esp. komisiono de Uzbeka Amikeca Asocio kaj de la gesperantistoj de Uzbekistano sendis (8.3.) al esperantistinoj de CSR la komisiona prezidanto K. Sakirov kaj membro de la komisiono P. Poliščuk.

internacia panoramo

BRAZILIO - En Porto Alegre okazis en oktobro 1978 Tutmonda ekspozicio de infandeseĝnaĵoj. Tridek sep landoj partoprenis, inter ili Ĉeĥoslovakio, per deseĝnaĵoj, kiujn peris M. Adamcová el Brno kaj D. Bartošík el Prago. Tiuĵ el Brno havis grandan sukceson kaj kelkaj estis reproduktitaj en la ĉefaj gazetoj.

HUNGARIO - Somera Esperanto-Universitato estos jam la 17an fojon en la sudhungaria urbo Gyula inter la 8a kaj 14a de julio. Pere de prelegoj, koncertoj, filmpre-

zentadoj, ekskursoj ktp. oni povas ekkoni naturajn kaj historiajn trezorojn de tiu ĉi landparto.

POLLANDO - En la kadro de la Kongreso pri kulturo sub la auspicio de UEA oni organizas kulturen seminarion en Bydgoszcz (30.5. - 3.6.).

SVISLANDO - Okaze de la 64a UK en Lucerno la sviea poŝto eldonos Esperanto-poŝtmarkon. Motivo estos varmaera balono kun surskribo Esperanto kaj kun la kongresa indiko.

ALIGU AL SEFT

Promenojn en sgvaga naturo, banadon kun aŭ sen bankostumoj, fiskaĵadon, k.a. vi povos guli dum SOMERA ESPERANTISTA FAMILIA TENDARO (SEFT) en la distrikto Neubrandenburg, GDR. Ĝi okazos inter la 18a kaj 25a de aŭgusto 1979 sur la tendeĵo C-86 en la arbaro ĉe Thomsdorf en pitoreska regiono de Feldberg. Aligoj eblaj nur por la civitanoj de socialismaj landoj (sopovantaj aŭ serioze interesigantaj pri Esp.-o). Organizas Kulturliĝo de GDR, Distrikta Laborrondo Esperanto, 20 Neubrandenburg, Jahnstr. 12.

TURISMAJ TAGOJ EN ŽILINA

E-klubo ĉe Domo de Sindikatoj en Žilina kune kun Regiona Kleriga Centro en Banská Bystrica organizos okaze de la 35-a datreveno de Slovaka Nacia Revolucio Turismajn Tagojn en Žilina. Partoprenontoj ekskursos al Vrátna-valo, Rokoĵ de Súľov, banloko Rajecké Teplice kaj Kunerad. Interesaj piedekskursoj - akvofaloj - rokoĵ -

visa^{KAJ}smetol

lahôdkové mliečné margaríny na prípravu chutných koláčov

Maslové, linecké, orieškové a iné cestá ľahko pripravíte s použitím niektorého z lahôdkových mliečnych margarínov. *

VISA a SMETOL rovnako výborne vyhovujú na prípravu kysnutého cesta, cestá v prášku ako sú linecké s kokosom, vanilkou a pod. *

*konataj laktaj margarinoj



staj kukoj

por prepero de bongu

pitoreska pejzago. La partoprenkotizo 170,- Kcs inkluzivas logigon, ekskursojn kaj organizaĵajn elspezojn. Dato de la aranĝaĵo: 23.-26. 8. 1979. Invitilojn, aligilojn kaj informojn petu ĉe: Ladislav HANZEL, Hlíný IV/406 A, 010 01 ZILINA 1.

(vln)



Per ĉiuj 25 yertoj vi pagas 15 Kcs au 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turuigu al viaj perantoj pli detalaĵ informoj!

S-ro George Partlow, 31jara komputera programisto, edziginta, 544 West 12th Street, Juneau, Alaska, USA • F-ino Kadri Jaagupalu, 17j lernan-

Dary svazu

Arch. J. Drlik, Praha (13.2.)
1.000,- Kcs o Univ. prof.
A. Lamprecht, Brno 200,-Kcs.
Koran dankon al vi ĉiuj!

tino, SU-202900 Viljandi, str. Kõstani 17 • F-ino E n e Jarv, 15j lernantino, SU - 202900, Viljandi, str. Pihlaka 3 • F-ino Leila Kimmel, 15j lernantino, SU - 202900 Viljandi, str. Laane, 6-99 • (kursgvidanto A. Mikk, SU - 202900 Viljandi, str. Kauga, 30-35) • Lya Sepp, Piret Sinkel, Heljli Vahtrik kaj Harry Kivimagi; skribu al komuna adreso: SU - 200090 Tallinn, PK 235, Estonio, US SR • Ant. Zbiral, Argentýn-gká ul. 6, 170 00 Praha 7, CSSR - kun Skandinavio • Jan Hadánek, 747 53 Jakarovice, okr. Opava, CSSR serĉas kunpartoprenanton al la UK en Lucerno. Li emas veturi per rapidvagonaro tra Aŭstrio. En detaloj interkonsento certa. Skribu baldau.

Nedezirata efiko

Certe neniu el ni kontraŭstaros la raciecon de la diraĵo koncerne skribadon kaj legadon, nome "nigra surblanke" ("černé na bílém"). Ju pli kontrasta estas la skribaĵo, des pli legebla ĝi estas. Sed ĵen kiel agas la plejmulto el ni, esperantistoj? Kial ni uzas ekz. en adresoj preskaŭ sole verd-kolorajn stampojn? Uzado de la "oficiala" movada koloro sur leteroj kaj aliaj poŝtaĵoj estas unue neracia kaj due iom sektema. (Sendube estas enorde uzi verdkoloran stampon sur movada dokumento, interne de letero, sur diplomo ktp.). Tie, kie la funkcio de la skribaĵo (stampita aŭ skribita) estas sciigi al la postisto tion, kiu ekz. estas la sendinto aŭ ke temas pri presado, tie ĝi estu esprimita "nigra surblanke", ĉar tiel ĝi estas nepre pli legebla ol "verda surblanke".



OFERTAS AL ĈIUJ PROJEKTISTOJ
NOVAN EKSTERVANDAN PANELON

F 300

POR LA UZO ĈE VANDIZO
DE INDUSTRIOJ KONSTRUAĴOJ

La teĥnikajn kondiĉojn sendas
kaj pluajn informojn donas livera
fako de la entrepreno

tel. 75 93 21-4

Stavokonstrukce np.

Praha 1

U pŭjčovny 9

Kaj ankoraŭ ion: certe ne estas nepre necese, ke en adresoj - destinitaj ja sole por rapida kaj klara tralego fare de poŝtistoj kaj baldau plejparte de specialaj lego-aparatoj - ni skribu tiajn gentilajn titolojn kiel "estimata samideano", "samideano", "ŝatata sinjoro" ktp. ktp.? Tiaj epitetoj, historiaj transvivintoj, ne povas esprimi nian estimon al la adresito (cu al la lego-aparato, kiu distribuas la leterojn?), estas tute senfunkciaj kaj por la poŝto eĉ nedezirindaj. En adreso de enlanda leteroj tiaj povas efiki tre negative, ĉar ili kreas - almenaŭ ĉeleterportistoj - imagon, ke la adresito havas ian strangan rangon kaj titolon en la sekto, kiu sin nomas esperantistoj. Tiaj efikoj ni certe ne deziras. Ni do agu racie, cetero lau la modeloj de adresoj, kiuj estas montrataj en ĉiu poŝtoŝtanco en Ĉeĥoslovakio.

Zd. Hršel, Botanická 28, 602 00 Brno.



DEK ĈAPITROJ PRI LA INTERNACIA LINGVO

KONTINENTO SEN INTERPRETISTOJ nomigas ĉeĥlingva 130-paga libro de Oldřich Kníchal (eldonis ĈEA). La aŭtoro, de kiu jam aperis kelkaj publikaĵoj pri ĉu en Esperanto, skizas en dek ĉapitroj la problemon de la multlingveco, historion de la planlingva ideo kaj de la Zamenhofs lingvo, de ties movado kaj atingoj. La unua tiu-specca verko en la ĉeĥa lingvo. Grafika arango J. Klement. Prezo 13 Kčs, formato A5, koverto plastika, ofset-presita, dukolora.

Mendojn akceptas Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská strato 10, 110 00 PRAGO 1., ĈSSR. Prezo por eksterlando: 4 Gld au egalvaloro en IRKP.

INFORMOJ DE SEKRETARIO

■ NENIU NIA KLUBO RAJŤAS DORMI! Jen klara respondo al ĉiuj, kiuj ankoraŭ ne orientigis post la 3-a asocia kongreso. Niaj eblecoj estas vastaj kaj vere variaj; neniu asocio okcidente guas tiajn. Nun ĉio dependos de ni mem, ĉar neniuj pe- t o s nin propagandi Esperanton, se ni ne kapablas trovi la manieron. La plej bona argumento estas agado por komunaj tutstataj celoj kaj bezonoj. Nia kampo estas ĉefe kultura, tamen ne nur tio. Ekzemple helpi al junpioniraj organizaĵoj fondi Klubojn de internacia amikeco, kunlabori kun packonsi-

DŮM MÓDY
PRAHA

středisko
kultury odívání

slouží

elegantním
ženám

moderním
mužům



lioj, organizi ekspoziciojn en la Internacia infana jaro, hel-
padi en propraj loglokoj plenumi taskojn de naciaj konsilan-
taroj, kolekti uzitajn krudmaterialojn ktp. Ĉio ĉi estas sam-
kvalitaj argumentoj kiel ekz. skribi kaj aperigi artikolon
en la gazeto.

Fondiĝu novaj lokaj grupoj. Ne estu eĉ unu urbo, kie ne a-
gadu nia Esperanto-grupo, kie ne ekzistus la Esperanto-mo-
vado!

La asocia estraro preparas la novan strukturon pri rekta
gvidado de la lokaj grupoj. Niaj aktivuloj permesos dormi al
neniu loka organizo. Se vi ankoraŭ ne trovis vian eblecon,
turnu vin al S^t. Papírnik, estrarano, kiu respondecas pri la
agado de LG, aŭ rekte al nia sekretario.

■ RESPONDECO DE UNUOPAJ ESTRARANOJ DE ĈEA ■

I. PLANADO

- preparo de kelk- kaj unujaraj agadplanoj,
- strategio kaj taktiko de la asocio,
- kontraktoj kun eksterlandaj partneroj.

resp. D-ro Jaromír JERMÁŘ, CSc - prezidanto de ĈEA
Zdenko KRIMSKÝ - sekretario de ĈEA

II. SOLVADO DE INTERNAJ ASOCIAJ KONFLIKTOJ, PLEDOJ

resp. D-ro Jaromír JERMÁŘ, CSc - prezidanto de ĈEA
D-ro Zdeněk RUSIN - estro de CRKK

III. REPREZENTADO DE LA ASOCIO

- traktado kun centraj organoj kaj institucioj,
- kontaktoj kun UEA, inkluzive de tiuj kun ĉefdelegito
de UEA.

resp. D-ro Jaromír JERMÁŘ, CSc - prezidanto de ĈEA
Zdenko KRIMSKÝ - sekretario de ĈEA

IV. KULTURA, LINGVA KAJ PEDAGOGIA AGADO

- prepararo de eldonplanoj,
- eldonado de presajoj, libroj k.a.,
- propagando, inkl. de respektivaj eldonaĵoj,
- lingva eduko,
- someraj lernejoj kaj tendaroj,
- direktado de pedagogia sekcio, ekzamena, lingva kaj
informada komisionoj,
- redaktoroj, tradukistoj.

resp. inĝ. Vlastimil KOČVARA - la vicprezidanto

V. AGADO DE LOKAJ GRUPOJ

- metodika helpo al LG kun preparo de iliaj laborpla-
noj,



KOMFORTE

RAPIDE

VI AĀETOS
EN KOOPERATIVAJ
UNIVERSALAJ
MAGAZENOJ

PETŘINY
PRAHA 6
NA PETŘINÁCH 55

ŠÁRKA
PRAHA 6
LENINOVA 695

PANKRÁC I.
PRAHA 4
UL. M. PUJMANOVÉ



VĀELA
KOOPERATIVO
POR PRAGANOJ

- fondado de novaj LG,
- stabiligo de la membraro,
- kontrolo de agado,
- kunlaboro kun aktivuloj de CK de ĈEA.

resp. Stanislav PAPIRŇÍK - estrarano

VI. EDUKO DE JUNULARO. JURA KAJ IDEOLOGIA AGADOJ

- laborjuro kaj helpantoj de asocio,
- preparo de novaj funkciuloj el administra vidpunkto,
- gvidado de junulara komisiono,
- konstituigo de Interkluboj,
- politika kaj eduka komisiono,
- porpaca sekcio.

resp. Věra PODHRADSKÁ - 2a vicprezidantino


VII. ALIAJ KOMISIONOJ KAJ SEKCIOJ - ILIA AGADO

- Sciencoteknika kaj Fervojistaj sekcioj
reso. Josef NOVÁK - estrarano
- Medicinista, blindula kaj turisma komisionoj
resp. Evžen DADÁK - estrarano

VIII. EKONOMIO

- kontraktoj pri produktado kaj servoj,
- interkonsentoj pri intersangoj, acetado kaj vendado,
- dispono kun budgeto, ties preparo, likvido de fakturoj ks.,
- mastrumado,
- laborkontaktoj kun juraj ligoj,
- aceto de investaj kaj neinvestaj aĵoj,
- librotenado,
- gvidado de la sekretario.

resp. Zdenko KRÍMSKÝ - sekretario de ĈEA



STARTO - nepravidelný věstník ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU, Jílská 10, Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Za obsah odpovídá O. Kníchal. Grafická úprava M. Lebašta. Tisk zajišťuje Technické ústředí knihoven Praha. Předáno do tisku 25. dubna 1979. Dohlédací pošta Praha 07, snížený poštovní poplatek povolen Ředitelstvem pošt Praha, j. zn. P/1 - 1267/79 ze dne 6. dubna 1979.

KOVOVÉ GARÁŽE

z ocelového plechu - základní nátěr
-dvoudílná vrata - sedlová střecha
-bez podlahy - snadná montáž buď
na podezdívku neb rovný terén.

Délka 4400 mm - cena 4.840,-Kčs

Délka 5300 mm - cena 5.350,-Kčs

Délka 6200 mm - cena 5.850,-Kčs

Šířka 3030 mm, výška 2450mm je u
všech tří typů stejná.

Šířka vrat 2000 mm, výška 1900mm.

Na zakázku vyrábí a v dodací lhůtě
2-4 měsíců dodá

INKLEMO
PRAHA, v.o.
Kovodělná Praha

Písemné objednávky adresujte malo-
obchod. úseku Inklemo Praha, Spojov-
vací 11, 190 00 Praha 9, tel. 830949
Osobně možno objednat v pražských pro-
dejnách družstva. Doprava pokud není za-
jištěna vlastním prostředkem, bude zajiště-
na družstvem. Garáže dodáváme výhradně
soukromníkům. Stavební povolení nutné.

75



HARMANECKÉ PAPÍRNY

Paperfarejo
en Harmanec

PREMITO PER LA ORDENO
DE RUĜA STELO, LABOR-ORDENO
KAJ DATRAVENO DE 30 JAROJ DE SNR.

PRODUKTAS ĈIUJN SPECOJN DE GRAFIKAJ PAPE-
ROJ, FILTRAJN PAPERROJN KAJ TABULOJN, PAPER-
PRODUKTOJN KAJ HIGIENAJN PRODUKTOJN.

NI EKSPORTAS EN 46 ŜTATOJ - DE LA MONDO.

